

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

IPR

Organo de Internacia Ligo
de Esperantistaj Instruistoj

ILEI

10-a jarkolekto

N-ro 1, 1980

Edistudio, Pizo, Italujo

ENHAVO

<i>Helmut Sonnabend — Malto — dua ponto al Afriko Loko de la ĉi-jara konferenco de ILEI</i>	1
<i>Bernard Golden — Normoj kaj celoj de la universitata instruado de Esperanto</i>	3
<i>Mario Dazzini — Raporto pri la Simpozio de ILEI en Parizo</i> ..	13
<i>Anja Hurčak — Raporto pri LOI en la baza lernejo "Bratstvo" Jedinstvo en Rijeka</i>	16
<i>Yves Guéguénat — "Ni parolu pri faktoj!"</i>	18
<i>Olle Olsson — Al sekciestroj kaj membroj de ILEI</i>	21
<i>Eugène Raveloson — Malagasio aŭ Madagaskaro</i>	22
<i>Zsuzsa Barcsaj — Alvoko</i>	23
<i>Enrique Kohei — Unua Tut-Amerika Esperanto-kongreso</i> ..	24

Malto — dua ponto al Afriko Loko de la ĉi-jara konferenco de ILEI

Helmut Sonnabend
prezidanto de ILEI

Antaŭvidite ĉi-jare estis kiel loko de nia konferenco Tananarivo, ĉefurbo de la ŝtato Malagasio. Post kiam montriĝis, ke la registaro ne deziras akcepti nin, ni volonte sekvas la inviton de niaj samideanoj Carmel Mallia, John Vella Bondin kaj Antony Mercieca manifestacii nian 14an konferencon en Valletta, la ĉefurbo de Malto.

Malto konsistas el pluraj insuloj kaj situas en la Mediteraneo, 95 km sude de Sicilio kaj ne malproksime de Afriko. Al la ĉefinsulo Malto ankaŭ apartenas la insuletoj Gozo kaj Comino kaj areas entute al 310 km². La angla lingvo estas apud la malta la oficiala lingvo.

En 1964 fariĝis Malto sendependa ŝtato en la kadro de la Brita Konfederacio. La valuto estas la Malta-pundo.

Etne la Maltanoj formiĝas el Araboj, Sicilianoj, Italoj, Francoj kaj Angloj.

La enloĝantoj parolas la maltan lingvon, araban idiomon de la Magreb-dialektoj, kiu kiel unusola estas parolata de kristana popolo kaj skribata oficiale per latinaj literoj apoge al la itala ortografio. Ĝi enhavas multajn italajn fremdvortojn, ne influita de la skribaraba sed fonetike de la antikva suditala Greka kaj Latina lingvoj.

Lerneja devigo estas preskribata por ĉiuj la infanoj inter ses kaj dekkvar vivjaroj. Instruaj lingvoj estas la malta kaj la angla. Al la okjara Elementa Lernejo aliĝas la kvinjara Sekundar-lernejo kaj profesiaj aŭ faklernejoj. Apud la publikaj ekzistas ankaŭ privataj lernejoj. Altlerneja klerigado peras la College of Arts, Science and Technology kaj la Royal Academy of M. Ekde 1946 estas aranĝitaj vesperaj klasoj por plenkreskuloj sen lerneja klerigado.

La konciza superrigardo sufiĉu por havi iom ideon pri nia konferenca loko.

La sepdekaj jaroj nun finiĝis. Kiam ni prijuĝas ilin rilate nian ILEI-laboron, ni povas sobre konstati, ke ni atingis kelkajn rezultojn:

- rekonita de UNESKO kaj akceptita en grupo C
- du sukcesplenaj lernejoj eksperimentoj en la regionoj I kaj II
- internaciaj lernejoj en Primošten kaj St. Gerard
- la unua libro el la «kajeroj de Internacia Pedagogia Revuo» (Helmut Sonna-

bend, *Esperanto, lerneja eksperimento — raporto - analizo - konkludo*, Edistudio, Pisa 1979)

- monda ekspozicio de infandeseĝnaĵoj sub la moto: Ne raso sed ni infanoj vivas en la mondo
- simpozio en Parizo: Principaj kondiĉoj por ĝenerala internacia-eŭropa lingvo
- sistema konigado de niaj rezolucioj ĉe registaroj kaj oficialaj instancoj
- disvolviĝo de ILEI al 34 sekcioj
- disvolviĝo de kunlaboro kun: FIMEM, SAT, UEA.

La finiĝinta Jaro de la Infano instigis al ni i.a. rezolucie konstati, ke la profundaj kaŭzoj de milito, manko de paco, malsato kuŝas en la nesufiĉeco de klerigado, instruado kaj edukado. La rezolucio estis sendita al multaj registaroj kaj aliaj gravaj instancoj (bedaŭrinde pluraj sekcioj ne sekvis la peton de la prezidanto, traduki la tekston!). La eĥo estis pozitiva — ĉiuj alskribitaj konfirmis la ricevon de nia rezolucio, inter ili la prezidento de la respubliko Francio.

La oka jardeko estu por ILEI la jardeko de la infano. Ni sekvu malpli la disvastigadon de Esperanto ol pli per Esperanto la defendon de la infano. Ĉiuj de niaj esploroj kaj agadoj servu je la bono de la infano.

Tial ni elektis tute konscie la temon de nia 14a konferenco: Edukado. Sendube estas unu el la grandaj problemoj la analfabetismo. Kvindek procentoj da homoj en legkapabla aĝo ne scipovas legi.

La enkonduka prelego dum la inaŭguro okupiĝos pri la demando: kiamaniere Esperanto povas helpi venki la analfabetismon.

La solvo de la problemo aparte urĝas en Afriko, kaj pro la relativa proksimo al Nordafriko ni ĉefe tien direktos la rezulton de nia laboro.

Antŭvidataj estas laborgrupoj okupiĝontaj pri detalaj demandoj de la ĉeftemo kiel ekz.: Edukado kaj internacia jaro de la kriplulo. «La ronda tablo» kunigos sindikatestrojn, instruistojn, reprezentantojn de kulturaj instancoj, por diskuti la temon: «Edukado kaj lingvo-diverseco-problemoj kaj solvoj».

Al la lingvo mem estos dediĉata multe da tempo: kursoj por komencantoj kaj progresintoj, konversaciaj kursoj kaj studgrupoj.

Pri la kulturaj aspektoj de Malto ni spertiĝos per diversaj prezentadoj kaj ekskurso.

Kaj kiu jam baniĝis en la mediterarea maro ekde la plaĝo de Malto? La agrabla baniĝo apartenas al la programo.

Cetere: kiam ni traktos la edukadon teorie estus la praktiko necesa. Partoprenontaj gekolegoj kunportu siajn infanojn en lernkapabla aĝo: ili povos ekzerci sin en la lingvo kaj lerni flegi internaciajn kontaktojn. Kiuj ankoraŭ ne aliĝis al la 14a konferenco bonvolu uzi la ĉi-enan aliĝilon!

Normoj kaj celoj de la universitata instruado de Esperanto.

Bernard Golden

Enkonduko.

Superrigardo de la historio de la instruado de Esperanto sur la universitata nivelo troviĝas en *Esperanto en Perspektivo*, (Lapenna k.a., 1974, p. 103-108) kaj en artikolo de H. Tonkin (1977). Laŭ ĉiuj nunaj indikoj, tiu instruado daŭre plivastiĝos en la estonteco por plenumi du ĉefajn funkciojn: eduki instruistojn de Esperanto por la elementa kaj mezgrada niveloj, kaj ankaŭ trejni lingvistojn, kiuj entreprenos sciencajn esplorojn sur la tereno de la interlingvistiko. Estas instruive kompari la nunan situacion kun tiu antaŭ preskaŭ duonjarcento, kiam *Enciklopedio de Esperanto* (Kökény kaj Bleier, 1933-1934, vol. 2, p. 549-550) dediĉis nur 12 liniojn al la temo «universitatoj».

La universitato, kie ekzistas hodiaŭ la plej ampleksa programo de Esperanto-instruado estas la Scienca Universitato Loránd Eötvös en Budapeŝto. Tie, en kadre de la Katedro pri Ĝenerala kaj Aplika Lingvistiko de la Filologiscienca Fakultato, funkcias la Fako pri Esperanta lingvo kaj literaturo, kies gvidanto estas d-ro István Szerdahelyi. Detaloj pri la instruprogramo troviĝas en «La programoj de la Filologia Fakultato — Fako Esperanto lingvo kaj literaturo», 11-paĝa multobligita prospekto eldonita okaze de la Instruista Internacia Konferenco organizita en 1970 en Maribor, Jugoslavio. Lajos Kökény koncize priskribas la agadon de la Fako en artikolo en *Hungara Vivo* (Kökény, 1973, p. 28). Pli ĝisdata estas la artikolo «Studprogramo de la Esperanto-Fako» aperinta en *Esperantologiaj Kajeroj* 2 (1977, p. 31-40), kaj en la sama numero Zs. Varga-Haszonits resumas la historion de la Fako dum ĝia unua jardeko de 1966-1976 (p. 7-30).

La studentoj, kiuj frekventas la Esperanto-Fakon, estas kaj hungaraj kaj eksterlandaj. Ili povas studi aŭ en la taga kurso aŭ en la koresponda kurso. Kiam ili finas la 10-semestran studadon, ili devas prezenti sin por ŝtata ekzameno, kies sukcesa trapaso estas kondiĉo por ricevi diplomon kun la kvalifiko «Mezlerneja instruisto pri Esperanta lingvo kaj literaturo».

Ĉiu studento en la Fako devas prepari libere elekteblan faklaboraĵon, kiu ofte

temas pri iu aspekto de la esperantologio. Krome, «memvole entreprenita devo» estas partopreno en la Scienca Studrondo de Esperantistaj Studentoj, kie la universitatoj havas okazon prezenti individue aŭ kolektive alispecajn, studrondajn laboraĵojn. La Studrondo ne okupiĝas nur pri sciencaj esploroj; ĝi havas la karakteron ankaŭ de societo de verkistoj, poetoj kaj artradukistoj; cetere, ĝi organizas perfektigajn kursojn por instruistoj.

La lingvouzo de la universitataj studentoj.

Kelkaj el la 19 faklaboraĵoj kaj 13 studrondaj laboraĵoj jam estis publikigitaj en *Esperantologiaj Kajeroj* 1 kaj 2, kaj en la 3a volumo de la serio troviĝas hungaraj kaj Esperantaj tradukaĵoj faritaj de studentoj de la Fako. Tiel, ekzistas sufiĉe ampleksa materialo por taksu la gradon de lingva kompetenteco, kiun la studentoj atingis. Okulfrapa estas la ofteco de ortografiaj, gramatikaj kaj semantikaj eraroj. Mi pritraktis kelkajn el ili en artikoloj kaj referaĵoj (Golden, 1978a, 1978b, 1979a, 1979b). Stilaj malgataĵoj svarmas en tradukaĵoj, kiuj spegulas la vortordon kaj esprimanieron de la gepatra lingvo de la studentoj.

Ĉi-kuntekste mi deziras mencii la opinion de usona lingvisto okupiĝanta pri la universitata instruado de Esperanto. R. E. Wood (1975, p. 67) asertas, ke la studento de Esperanto, unue iom post iom liberigante sin de kalkeoj (paŭsaĵoj, prunttradukoj), mortintaj metaforoj, etenditaj signifoj, kliŝoj kaj fiksaĵoj, kiuj konstituas grandan parton de la tiel nomata *Standard Average European* (norma, meza eŭropa lingvo), kaj poste koncentrante sin je la internaj riĉecoj de la Internacia Lingvo povas iri trans siajn etnolingvajn modelojn kun ĉiam pli kreivaj rezultoj.

Teorie, tio ja povas okazi, sed post kiom da tempo kaj fortostreĉo? Evidente, 10 semestroj ne sufiĉas. Ĉu, do, estas eble ekscii, kial universitataj studentoj — kaj eĉ tiuj, kies fako estas la lingvistiko — havas la samajn malfacilaĵojn alproprigi al si Esperanton, kiujn havas aliaj lernantoj?

Metodologio de la universitata instruado de Esperanto.

Povas esti, ke la metodologio de la instruado de Esperanto sur la universitata nivelo ankoraŭ ne atingis la saman nivelon kiel la metodologio uzata por instrui aliajn fremdajn lingvojn. Citindaj estas la vortoj de H. Tonkin ĉi-rilate.

«La provizo de instruistoj pligrandiĝos, kompreneble, nur kiam oni pli grandskale disponigos Esperanton al studentoj en universitatoj kaj kolegioj, kaj kiam la metodologio de la instruado de Esperanto evoluos ĝis pli alta nivelo, ol ĝi atingis ĝis nun.» (Tonkin, 1976, p. 7)

En alia verko de la sama aŭtoro (Tonkin, 1977a, p. 35-36), troviĝas bibliografiaj donitaĵoj pri la plej ĝisdataj metodologiaj studaĵoj. Ili temas plejparte pri la elementaj kaj mezgradaj niveloj, sed ankaŭ citita estas raporto de simpozio pri la instruado de Esperanto en usonaj universitatoj kaj kolegioj: Richard E. Wood, «Proceedings of

the Symposium on the Teaching of Esperanto at United States Universities and Colleges,» (*La Monda Lingvo-Problemo*, 4 [1972], p. 159-174).

La plej detala verko en Esperanto pri la metodologio de lingvo-instruado (Szerdahelyi, 1975) okupiĝas ĝenerale pri la historio kaj metodiko, sed ĉar la enhavo estas laŭtema kaj ne laŭgrada, ne estas aparta traktado de metodologiaj problemoj de la instruado de Esperanto sur la universitata nivelo. En kelkaj aliaj verkoj oni povas informiĝi, se ne pri la detala metodologio por universitata uzo, almenaŭ pri la celoj de la instruado.

Celoj de la universitata instruado de Esperanto.

En pli frue aperinta metodologia libro, Rakuŝa (1970) dediĉas nur du paĝojn (p. 9-10) al la instruado de Esperanto en pedagogiaj altlernejoj kaj universitatoj, kie la ĉefa celo estas prepari instruistojn de la Internacia Lingvo por elementaj kaj mezgradaj lernejoj. Rakuŝa dividas la edukon en du ŝtupojn:

«...en la unua perfektigigas la kandidato en Esperanto ĝis parola kaj skriba perfekteco, en la dua — kondiĉe akceptekzameno — la prelegantoj gvidas lin al sufiĉa scio de konoj necesaj por bona instruado de la lingvo.»

Tiu dua ŝtupo temas pri «la metodika, literatura, historia kaj movada preparo». Cetere, Rakuŝa substrekas, ke:

«...oni devas... severe distingi la... du ŝtupojn. Kiu ne parolas flue Esperanton, ne havas lokon en la dua ŝtupo.»

La aŭtoro nek pli detale difinas «parola kaj skriba perfekteco», nek indikas, kiel oni povas mezuri tion. Ĉu temas pri absoluta perfekteco, t.e. tute senerara uzo de la lingvo? Kiu en la historio de Esperanto atingis tiun stadion? Eĉ Zamenhof faris erarojn. Estas evidente, ke oni devas limigi la nocion «perfekteco», por ke ĝi signifitu relativan perfektecon. Certajn erarojn oni ja ne toleru, sed aliajn oni povas preterlasi, ĉar ili havas duarangan gravecon.

Ankaŭ Szerdahelyi, en unu el siaj fruaj metodologiaj verkoj, parolas pri perfekteco.

«Kiel ĉiu lingvo, ankaŭ Esperanto estas perilo, instrumento de penskomunikado. La perfekta aktiva kaj pasiva scio de la parolata kaj literatura Esperanto estas la *praktika celo*.» (Szerdahelyi, 1964, p. 47).

Aliloke en la sama verko (p.65) Szerdahelyi klarigas, ke la terminoj «aktiva» kaj «pasiva» rilate lingvoscion estas malnovmodiĝintaj, ĉar hodiaŭ en la faka literaturo estas uzataj «receptiva» anstataŭ «pasiva», kaj du terminoj, «reproduktiva» kaj «produktiva», anstataŭas «aktiva». Se la lingvoscio atingas nur la gradon de reprodukteco, ĝi estas «reproduktiva»; se oni povas uzi la lingvon same kiel la gepatran, la lingvoscio estas «produktiva».

Eble estos utile substitui la terminon «produktiva scio» al «perfekta scio», kiam oni difinas la celon de la lingvoinstruado.

La instruprogramoj de la Esperanto-Fako de Budapeŝta Universitato pli detale priskribas la celojn de la kurso. En la versio de la programo eldonita en 1970, estas

postulate, ke ĉe la fino de la kurso Esperanto I kaj II, la studento

«a) scipovu flue kaj esprimplene laŭlegi kaj kompreni neellaboritan Esperanto-tekston, kompreni aŭditan prelegon aŭ fluan parolon, normal-taktan.

b) Oni devas atingi tian gradon de leksikaj, fonekitaj kaj gramatikaj konoj, ke la studento, je la fino de la kurso sen signifaj gramatikaj eraroj kapablu konversacii, regu bonan kompil-kapablon kaj scipovu mez-malfacilan tekston traduki el kaj en gepatran lingvon per minimuma uzo de la vortaroj.

c) La studento kapablu firme uzi la dulingvajn vortarojn de Esperanto, la Plenan Vortaron kaj la ceterajn specialajn vortarojn.» (*La Programo de Filologia Fakultato...* p. 2)

Jen la celoj en la jaro 1977. Rilate la ĝeneralan formadon,

«La fako celas formi fakulojn, kiuj havas marksisman mondkoncepton, bonnivelaĵajn lingvokapablojn, vastajn konojn pri esperantologio kaj interlingvistiko, kiuj kapablas disvolviĝi [tiele!] laŭ socialisma spirito la kreivan pensadon de siaj lernantoj, de siaj studentoj en la instruaj kaj en aliaj kulturaj institucioj.» (*Studprogramo de la Esperanto-Fako*, 1977, p. 31)

La celoj de la kurso Esperanto I kaj II estas nun iom pli koncize difinitaj.

«a) flue paroli, kompreni nekonatan tekston, aŭde kompreni prelegon, raporton pri ĝenerala temo;

b) atingi tiomgradan konon de vortrezoro kaj gramatiko, ke ili povu bone sin esprimi ĉu parole ĉu skribe, traduki gepatralingven kaj reciproke meze malfacilan tekston;

c) uzi diversajn vortarojn (Plena Vortaro, fakaj, etimologiaj) ktp.» (*Studprogramo...*, 1977, p. 33).

Kaj la celo de la studobjekto «Lingvopraktiko de Esperanto» estas

«La studento akiru vastajn, multflankajn kaj certajn lingvo-konojn, povu libere konversacii kaj flue raportii, alproprigi la materialon de la lekcioj “Esperanto I-II”.» (*Studprogramo...* 1977, p. 34)

Evidentiĝas, ke en 1970 kaj 1977 la celo akiri pasivan scion de Esperanto estas esprimita preskaŭ senŝanĝe. Male, en 1970 oni devis atingi aktivan scion «sen signifaj gramatikaj eraroj», dum en 1977 la aktiva scio de Esperanto devas esti «tiomgrada» por «bone sin esprimi ĉu parole ĉu skribe, traduki...» Ankaŭ la ĝenerala celo de formado en la Fako aludas «bonnivelaĵajn lingvokapablojn», sed nenie estas klarigo pri la maniero objekte taksii ilin. Kontraste kun la postuloj de Rakuŝa, kaj ankaŭ Szerdahelyi, la Esperanto-Fako de Budapeŝta Universitato forlasis la koncepton de perfekta scio de Esperanto kiel celon de la instruado kaj kontentiĝas per la iom nebula nocio «bona» scio.

Gradoj de perfekteco.

Estas eble pli facile difini minimuman lingvokapablon ol maksimuman. Se oni povas kompreni sin Esperante kaj kompreni, kion alia diras aŭ skribas, eĉ sur la plej malalta nivelo, t.e. malbonnivelo, oni ja povas praktike uzi la lingvon. Sed ĝis oni povas difini «signifaj eraroj», estas neeble precizigi «bonnivelaĵajn lingvokapablon». Rigardante la aferon de praktika vidpunkto, oni povas fari jenan demandon: kiom da eraroj kaj kiajn erarojn rajtas transdoni al siaj estontaj lernantoj, studento, kiu preparas sin por instrui Esperanton?

Tasko por Esperanto-metodikistoj estas difini diversajn nivelojn aŭ gradojn de «perfekteco» en la uzo de la lingvo per specifaj celoj: instruado sur diversaj niveloj, de- kaj altradukado de beletraĵoj kaj sciencaj verkoj, originala verkado, redaktado de publikigaĵoj, movad-organiza laboro, ktp. Krome, estas bezonataj science organizitaj esploroj pri ĉiuj aspektoj de la instruado de Esperanto sur la universitata nivelo. Kiu entreprenos tiun laboron, ne trovos ĝin facila. Post citado de informoj pri la nombro de universitatoj, kie Esperanto estas instruata, Tonkin skribas:

«La statistiko mem ne estas tre signifoplena, ĉar kompreneble la kvalito kaj nivelo de instruado multe diversas, la nombroj de studentoj estas tre variaj, kaj la kondiĉoj por funda esplorado ankaŭ signife varias.» (Tonkin, 1977b, p. 224)

Richard E. Wood (1975, p. 66) priskribas proponitan eksperimenton pri la instruado de Esperanto en usonaj universitatoj. La celo estas determini la taŭgecon de Esperanto kiel universitata lernobjekto kaj kiel ebla alternativo de etnaj lingvoj en la lingva edukado de studentoj en humanismaj fakultatoj. Kvankam estas akcentita la graveco de ekzamenado por pedagogiaj celoj, ŝajnas ke tiu eksperimento ankoraŭ ne efektiviĝis, do ne estas haveblaj objektivaj donitaĵoj pri la alproprigo de Esperanto fare de universitataj studentoj.

Malfacileco de Esperanto.

Ĉu eble unu el la kaŭzoj de erara uzo de Esperanto fare de universitataj studentoj estas la naturo mem de la Internacia Lingvo? Eble ĝi ne estas tre facila lingvo, malgraŭ la troiga propagando de kelkaj zelotoj. Tiu ĉi nocio ne estas fremda al metodikistoj.

«Ofte la lernantoj komencas seniluziigi, kiam rimarkas, ke ankaŭ en Esperanto oni devas lerni, ke ankaŭ Esperanto postulas laboron kaj tempon. La neĝusta “propagando” pri la trofacileco de Esperanto kaŭzas ofte trompiĝojn.» (Szerdahelyi, 1975, p. 308)

«Estante artefarita lingvo, Esperanto estas *pli facila* ol la naciaj lingvoj, sed ne tiel facila, ke oni povu ĝin paroli sen sistema, konsekvenca lernado.» (Szerdahelyi, 1964, p. 48)

Tamen Rakuŝa provas minimumigi la emfazon pri la malfacilaĵoj.

«Se niaj propagandistoj troigas la facilecon de Esperanto, kontraŭe kelkaj

fakuloj troigas la malfacilaĵojn.» (Rakuša, 1970, p. 38)
Li pledas por la instruado de Esperanto sen la gramatikaj subtilaĵoj de la perfektigistoj. Sed kie troviĝas la limo inter la ĝusta uzo de Esperanto kaj la troemfazo pri tiuj «gramatikaj subtilaĵoj»? En la libro de Rakuša mi trovis tre oftan misuzon de transitivaj kaj netransitivaj verboj (Golden, 1978b, 1979b). Ĉu la transitiveco de verboj estas unu el malfacilaĵoj de Esperanto, kiun oni troigas? Male, miaopinie, lernolibroj kaj vortaroj ne sufiĉe detale pritraktas tiun temon, kaj pro tio eraroj similaj al tiuj, kiujn Rakuša mem faris, svarmas en eĉ la plej prestiĝaj publikigaĵoj, por ne menciigi ankaŭ la laboraĵojn de la universitataj. Kion diri pri studenta verko pritraktanta ĝuste «tranzitivajn» [tiele!] verbojn, kies aŭtoro ne kapablas distingi inter barbarismoj: «rilatiĝas al la verbo», «speguligi alian flankon», «kiuj servas bazan materialon», «ŝprucas la akvon en la vizaĝon»; «ŝprucas la vizaĝon per akvo»? (Barcsay, 1976).

Parolante pri malfacilaĵoj, oni devas substreki, ke estas du specoj: tiuj, kiuj estas ligitaj al interfero pro la malsimila strukturo de la gepatra lingvo de la lernanto, kaj tiuj, kiuj estas universalaj, komunaj al parolantoj de plej diversaj lingvoj. Szerdahelyi (1976, p. 197-233) detale pritraktas tiun ĉi temon.

Tonkin opinias, ke Esperanto estas facile lernebla por profesiaj lingvoinstruistoj.

«Pro tio, ke Esperanto estas facile lernebla, profesia lingvoinstruisto povas aldoni ĝin al sia repertuaro sufiĉe rapide — La kolegia instruisto de la franca aŭ la hispana povas rapide atingi nivelon de kompetento, ĉe kiu li aŭ ŝi povas mem instrui kursojn en Esperanto de tempo al tempo...» (Tonkin, 1976, p. 4)

Sed la aŭtoro ne pritraktas la specifajn normojn de lingvouzo kaj scio, kiujn devas atingi rapide lernanta lingvoinstruisto. Kion signifas tiu nebula frazero «nivelo de kompetento», kiu ebligas la instruadon de Esperanto?

Szerdahelyi emfazas la gravecon de la instruisto.

«8. Kiel influas la instrumentodon la persono de la instruanto? La fremdlingvo-instruado estas tiu studobjekto, kie en la sukceso de la instruado ludas la plej gravan rolon la persono de la instruanto. Por sukcesi, la Esperantoinstruisto devas: ...c) stari super la instrumaterio. Li devas scii nepre multe pli ol li prezentas al la lernantoj.» (Szerdahelyi, 1964, p. 48-49).

Tonkin kaj Rakuša ŝajne postulas du malsamajn normojn por la instruisto de Esperanto: kompetenton kaj perfektecon. Kaj Szerdahelyi postulas iom profundan scion. Denove altrudiĝas la demandoj: ĉu oni toleru diversajn gradojn de perfekteco ĉe lernantoj kaj instruantoj? Kiel difini tiujn gradojn?

Lerniloj.

Kiomgrande dependas la mislernado de Esperanto de la uzataj lernolibroj kaj vortaroj? Kalocsay esprimis opinion en recenzo pri libro prezentanta neortodoksan vidpunkton pri la Esperanta gramatiko, dirante ke «... el ia ajn lernolibro oni povas lerni Esperanton, se oni volas.» (Kalocsay, 1974, p. 29). Jes ja, se oni volas, sed por

multaj lernantoj kaj studentoj, malbonaj lerniloj estas ankoraŭ unu stumbligilo, kiu malfaciligas la lingvolernadon, ĉu temas pri etnolingvoj, ĉu pri Esperanto.

La lernolibro uzata en Budapeŝta Universitato estas gramatiko verkita de d-ro Szerdahelyi (1972) en la hungara lingvo. Ĝi, do, ne estas por internacia uzo kaj konjekteble prezentas la gramatikon de Esperanto en maniero speciale taŭga pro parolantoj de la hungara lingvo. Tiu ĉi verko estis kontrol-legita antaŭ publikigo fare de Géza Bárczi, eminenta hungara lingvisto kaj esperantisto. Nur fragmento de lia ampleksa kritiko estis publikigita en memoriga volumo enhavanta ĉiujn aliajn verkojn de Bárczi temantaj pri Esperanto (Bárczi, 1977). Tio estas bedaŭrinda, ĉar nur malofte alte kvalifikita lingvisto recenzas Esperantan lernilon, do lia prijuĝo de la universitata lernolibro de Szerdahelyi estas tre grava.

La plej bona gramatiko de Esperanto nuntempe havebla al hungaraj studentoj de Esperanto vere ne estas lernolibro sed konsultverko, *Rendszerezés esperantó nyelvtan* (Kalocsay, 1966), kiu estas hungarlingva resumo de *Plena Gramatiko*. Laŭ la programo de eldonado de la Esperanto-Fako de Budapeŝta Universitato, serio da universitataj lernolibroj pritraktantaj la lingvistikon kaj ankaŭ la literaturon en Esperanto estas planata (Varga-Haszonits, 1978), kaj tiuj verkoj certe helpas forigi la ĝis nun ekzistantajn mankojn de universitatagradaj lerniloj por la instruado de Esperanto.

Tamen, restas unu grava manko, kiu verŝajne malaperos nur en la fora estonteco: bona dudirekta Esperanto kaj hungara vortaro. La sola libro nuntempe havbla estas duvoluma vortaro kompilita de Alfonz Pechan (1964b, c). Tiu malgrandformata verko ne taŭgas por filologia, lingvistika, beletristika kaj scienca celoj. Svarmas en ĝi neadekvataj tradukoj, hungarismoj kaj preseraroj — eĉ post kvar eldonoj! En ĝi ne troviĝas atentigaj rimarkoj ĉe vortoj, kiuj prezentas apartajn malfacilaĵojn por parolantoj de la hungara lingvo, ekzemple «falsaj amikoj», polisemiaj vortoj kaj paronimoj. Alia difekto de tiu vortaro estas la tendenco krei kalkeojn (paŭsaĵojn aŭ prunt-tradukojn) en Esperanto surbaze de la morfema enhavo de hungaraj vortoj. La daŭra uzado de tiaj vortformoj estigas malpi internacian Esperanton, kiu minacas fariĝi hungara dialekto de la Internacia Lingvo! Estas esperinde, ke la Esperanto-Fako entreprenos la taskon kompili ampleksan hungaran-Esperantan vortaron laŭ modernaj lingvistikaj principoj kaj leksikografiaj metodoj. Tiu vortaro povos esti modelo por alilingvaj Esperantaj vortaroj, kiuj tro ofte estas karakterizitaj per la difektoj menciitaj ĉi-supre.

Starigo de normoj kaj tolero de eraroj.

Por starigi normojn por etnolingvo oni povas elekti regionon aŭ tavolon de la parolkomunumo, kies lingvouzo estas rigardita de lingvaj fakuloj kiel altkvalita, kaj insisti, ke lernantoj de la lingvo imitu tiun lingvouzon. Se ne estas eble tiumaniere decidi pri normlingvo, ekzemple pro multeco de dialektoj, oni devas krei ĝin surpape, kaj la dua kriterio ofte proponita estas la lingvouzo de la plej bonaj verkistoj. Se temas pri planlingvo, la unua procedo ne estas ebla, ĉar ankoraŭ ne ekzistas sufi-

ĉe granda nombro de denaskaj parolantoj, kiuj povas roli kiel aparta parolkomunumo kun unueca lingvouzo. La dua kriterio ne estas tro facile aplikebla, ĉar estas necese unue decidi, kiuj estas la plej bonaj verkistoj kaj kial ili meritas tiun karakterizadon.

Szerdahelyi (1975, p. 209) proponas, ke oni konstruu la sisteman «gramatikon de eraroj», ĉar «... la komunaj, ofte ripetigantaj eraroj ne estas hazardaj...» Li pensas pri eraroj, kiuj rezultas el strukturaj konfliktoj inter la gepatra lingvo de la lernanto kaj Esperanto. Ekzistas, do, eraroj, kiuj karakterizas la lingvouzon de parolantoj de certaj lingvoj aŭ familioj de lingvoj, ekzemple tiuj, en kiuj la difina artikolo mankas, kaj universalaj eraroj, kies kaŭzo estas gramatikaĵoj same malfacilaj por ĉiuj, ekzemple la po-esprimo. Ĉu oni do toleru tiajn misaĵojn, ĉar estas malfacile instrui kaj lerni ilian norman uzon?

Antaŭ ol oni pritraktas nivelojn de lingva kompetenteco aŭ perfekteco kadre de la celoj de la instruado de Esperanto en universitatoj, estas necese profunde ekzameni la demandon pri signifaj eraroj kaj tolereblaj eraroj. Ambaŭ devas esti plejeble minimumaj por universitatanoj, kiuj preparas sin por instrui Esperanton.

Bibliografio.

BARCSAY, ZSUZSA

1976. «Verba regado kun prepozicio en Esperanto kaj la ekvivalentaj formoj en la hungara.» *Esperantologiaj Kajeroj*, Budapeŝto, n-ro 1, p. 185-236.

BÁRCZI, GÉZA

1977. «Szerdahelyi István: Eszperantó, bevezetés és nyelvgyakorlatok.» [prijuĝo]. *Esperantologiaj Kajeroj*, Budapeŝto, N-ro 3, p. 170-171 kaj 192 (hungara teksto).

GOLDEN, BERNARD

1978a. «La difina artikolo en la hungara lingvo kaj en Esperanto — kontribuaĵo al la 'gramatiko de eraroj'.» [referaĵo]. Sesa Studenta Interlingvistika Seminario, Varsovio, Pollando [manuskripto].

1978b. «La transitiveco de verboj en Esperanto.» *Dia Regno*, Vlaardingen, Nederlando, n-ro 8/9, p. 2096-2097.

1979a. «Kelkaj trajtoj de la 'hungara dialekto' de Esperanto.» [referaĵo]. Sesa Studenta Interlingvistika Seminario, Varsovio, Pollando [manuskripto].

1979b. «Transitivaj kaj netransitivaj verboj en Esperanto.» *Voĉo*, Borovo, Jugoslavio, n-ro 1/2, p. 27-30.

KALOCSAY, KÁLMÁN

1966. *Rendszeres Eszperantó Nyelvtan*. Budapeŝto.

1974. «Lingvo kaj logiko» [recenzo]. L. Mimo: Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto. Analiza Skolo. *Hungara Vivo*, Budapeŝto, vol. 14, n-ro 5, p. 29 [unua parto].

1975. *Hungara Vivo*, Budapeŝto, vol. 15, n-ro 1, p. 18 [dua parto].

KÖKÉNY, LAJOS

1973. «Esperanto en la Budapeŝta Scienca Universitato.» *Hungara Vivo*, Budapeŝto, vol. 13, n-ro 2, p. 28.

KÖKÉY, LAJOS — BLEIER, VILMOS

1933- *Enciclopedia de Esperanto*. Du volumoj. Budapeŝto. 1934.

LAPENNA, IVO — LINS, ULRICH — CARLEVARO, TAZIO

1974. *Esperanto en Perspektivo*. London, Rotterdam.

PECHAN ALFONSO

1964a. *Gvidlibro por Supera Ekzameno — I*. Budapeŝto.

1964b. *Eszperantó-Magyar Szótár (Esperanta-Hungara Vortaro)*. Tria eldono. Budapeŝto.

1964c. *Magyar-Eszperantó Szótár (Hungara-Esperanta Vortaro)*. Tria eldono. Budapeŝto.

PROGRAMO DE LA FILOLOGIA FAKULTATO (LA) — Fako Esperanto

Lingvo kaj Literaturo

s.d. (eldonita okaze de la Instruista Internacia Konferenco, Maribor, Jugoslavio, 1970). [mimeografiita - 11 p.]

RAKUŠA, RUDOLF

1970. *Metodiko de la Esperanto- Instruado*. Ljubljana.

RADOS, PÉTER

1972. «Testamento de forpasinta aktivulo.» [recenzo]. R. Rakuša: Metodiko de la Esperanto-Instruado. *Hungara Vivo*, Budapeŝto, vol. 12, n-ro 3, p. 29.

STUDPROGRAMO DE LA ESPERANTO-FAKO

1977. «Instrumetodo» en *Gvidlibro por Supera Ekzameno* redaktita de Alfonso Pechan, Budapeŝto, vol. 1, 2-a parto, p. 45-80

SZERDAHELYI, ISTVÁN

1971. «Gvidilo por la Esperanto-instruantoj.» [recenzo]. R. Rakuša: Metodiko de la Esperanto-instruado. *Heroldo de Esperanto*, Bruselo, n-ro 15 [1514], p. 4

1972. *Esperantó, bevezetés és nyelvgyakorlat*. Budapeŝto.

1976. [reeldono]

1975. *Metodologio de lingvostudado kaj parolalproprigo*. Budapeŝto.

TONKIN, HUMPHREY

1976. *Enkonduko al Esperanto-studoj*. Esperanto-Dokumentoj, nova serio, n-ro 4, E, Rotterdam.

1977a. *Esperanto and International Language Problems: a Research Bibliography*. Kvara eldono. Washington, D.C.

1977b. «Esperanto kiel objekto de universitata instruado kaj scienca esploro.» *Esperantologiaj Kajeroj*, Budapeŝto, n-ro 2, p. 221-235.

VARGA-HASZONITS, ZSUZSANNA

1977. «Dekjara historio de la Esperanto-fako.» *Esperantologiaj Kajeroj*, Buda-
pest, n-ro 2, p. 7-30.

1978. «Labordokumentoj de la budapeŝta Esperanto-fako.» *Hungara Vivo*, Bu-
dapest, vol. 18, n-ro 3, p. 117.

WOOD, RICHARD E.

1972. «Proceedings of the Symposium on the Teaching of Esperanto at United
States Universities and College.» *La Monda Lingvo-Problemo*, n-ro 4, p.
159-174. [citita de TONKIN, 1977a, p. 36]

WOOD RICHARD E.

1975. «Teaching the Interlanguage: Some Experiments» *Lektos*, Louisville, Ken-
tucky, Usono, p. 61-81.

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ I.L.E.I.

14a Internacia Konferenco — Malto 1980.07.24/08.01

I.L.E.I.
Mario Dazzini
Casella Postale 22
I-54100 MASSA (Italujo)

I.K.K.
Carmel Mallia
89 Sanctuary str.
ZABBAR (Malto)

ALIĜILO

6Bonvolu skribi klare, legeble, laŭeblke tajpe aŭ preslitere)

S-ro / S-ino / F-ino

familia nomo antaŭnomo

lando naskiĝjaro

loĝurbo strato, n°

Samtempe aliĝas per aparta aliĝilo:

edzo / edzino infanoj

.....

KOTIZOJ

Ĝis 1980.04.30: tranokto kaj manĝoj ĉe studenta kolegio, de la vespermanĝo 07.24 ĝis la tagmanĝo 08.02, en unuilta ĉambro samaj kondiĉoj en dudeklita ĉambro

mt. pundoj 65
mt. pundoj 55

Post 1980.04.30 la LKK ne certigas loĝadon en la sama kolegio kie disvolviĝas la laboroj de la konferenco, kaj post 1980.05.31 LKK ĝenerale ne plu certigas loĝadon.

Estante la nombro de la unuilitaj ĉambroj limigita, oni konsilas aliĝi tuj se oni ne volas dormi en dudeklita ĉambro.

Ne membroj de I.L.E.I. devas aldoni al la supre menciitaj kotizoj la sumon de 5 maltaj pundoj [ne pagenda de infanoj malpli ol 20-jaraj kaj de familianoj de kongresan(in)o].

Mi aliĝas al la konferenco kiel ILElano / familiano / infano / ne-ILElano kaj sendas:

por kotizo kiel ILElano maltaj pundoj

por kotizo kiel ne-ILElano maltaj pundoj

per internacia poŝtmandato aŭ bankĉeko al **Bank of Valletta** n° 01 391 3669, «ILEI-Conference, Malta».

Sendu la aliĝilon al **Carmel Mallia, 89 Sanctuary str., Zabbar, Malta.**

Mi alvenos la per ŝipo / per aviadilo

Mi deziras loĝi en dudeklita ĉambro kun S-ro / S-ino / F-ino

Specialaj deziroj (laŭ ebleco)

.

Dato

Subskribo

Raporto pri la Simpozio de ILEI en Parizo

Mario Dazzini

De la 18a ĝis la 20a de Oktobro 1979a okazis en Parizo ĉe la Amphithéâtre Durkheim de la Universitato René Descartes — La Sorbonne, I.L.E.I.-simpozio pri la temo «Principaj kondiĉoj por ĝenerala internacia eŭropa lingvo».

Partoprenis la simpozion 38 personoj; prelegis 10 kaj oni legis du pliajn referaĵojn de ne ĉeestantoj. Prezidis kaj gvidis la diskutojn Prof-ro Michel Duc Goninaz (kiel anstataŭanto de Prof-ro Istvan Szerdahelyi, kiu pro malsano ne povis ĉeesti) kaj D-ro André Albault. Interpretantoj S-ro Roger Bernard kaj Jean Thierry. Malfermis la simpozion D-ro Prof. Mario Dazzini, ĝenerala sekretario de I.L.E.I., kiu, anstataŭante la malsaniĝintan I.L.E.I.-prezidanton, Rektoro Helmut Sonnabend, alportis la saluton de la I.L.E.I.-estraro.

Tuj poste alparolis la ĉeestantojn Prof-ro François Frederic, la Direktoro de la Lingvistika Fakto, kiu gastis la Simpozion, asertante ke ne estas dezirinde ke nur 2 aŭ 3 lingvoj, ni diru la angla, la rusa aŭ la ĉina, estu la universalaj lingvoj kaj li rekonis ke la esperantistoj donas la ekzemplon en akordiĝo por havi lingvon per kiu la homoj estu vere egalaj; interalie li rekonis ke Esperanto nuntempe ne estas nur io kion oni instruas sed ankaŭ io pri kio oni estas altirata pripensi science.

En la tre ampleksa prelego «Kiu(j) lingvo(j) por kia Eŭropo?», Prof-ro Duc Goninaz konstatis ke en Eŭropo la lingva problemo pli kaj pli akutiĝas por la interŝtataj instancoj ĉefe okcidentaj (tradukproblemoj de EEK), por la individuaj kaj ne ŝtataj organizaĵoj (neefikeco de fremdlingva instruado por la amasoj, diktatoreco de plurlingva elito en la organizaĵoj. Por solvi la problemon, la diversaj ŝtatoj devos malvastigi la nombron de laborlingvoj ĝis 2-3, eventuale 1 (kiel en KEI, en kiu la rusa estas la nura laborlingvo), kio naskos senfinajn batalojn en la okcidentaj instancoj. La solvo per neŭtrala lingvo, proponata de la esperantistoj, evitus la grandan haoson pro la multlingveco kaj la danĝerojn de hegemonio de unu nura nacia lingvo, supozeble la angla.

Sekve Prof-ro Duc Goninaz legis france la tre interesan referaĵon de Claude Piron pri «Équité efficacité, richesse culturelle et communication linguistique», en kiu la aŭtoro montris la avantaĝojn de la uzado de I.L. Esperanto.

Raporto pri LOI en la baza lernejo «Bratstvo» Jedinstvo en Rijeka

Anja Hurčak

Antaŭ la komenco de LOI en tiu ĉi lernejo, la gepatroj de la koncernataj gelernantoj estas informitaj pri intencoj kaj instrumaniere de LOI (lingvo orientada instruado).

La instruado komencis en februaro 1979 kaj daŭris ĝis junio, unufoje semajne po 75 min. Entute okazis ĝis la fino de la lernejo 13 instruhoroj.

Partoprenintaj gelernantoj.

Anonĉigis 17 gelernantoj el la 3a lernejo (9-jaraj), 4 el ili ĉesis, sed je la propra deziro aliĝis 5 gelernantoj el la 5a klaso (10-jaraj). Do, la plejparto el 18 partoprenintoj estis 9-jaraj infanoj, kiuj regule sekvis la instruadon. Estas plenumitaj 8 lecionoj (1ab, 2ab, 3ab, 4ab) per uzado de la programitaj instruaĵoj kaj kun necesaj kontroloj pere de akompananta materialo, ĉio liverita de la FEOll-instituto en Paderborn.

La plej sukcesintaj lernantoj en prilaborado de la kontrollistoj, ĉiam estis premiataj per poŝtmarkoj, bildkartoĵoj, insignoj kaj diversaj esperantaĵoj (glumarkoj, esperantlingvaj presaĵoj kaj simile).

La prilaboro kaj valorigo de kontrol-listoj kaj la rezultoj en la rekta instruado montris, ke la partoprenintoj tre sukcese alproprigis al si la leksikon kaj lingvostukturojn.

Laŭ la finjara klasifiko 11 lernantoj havis la noton 'eminente', 4 estis 'tre bonaj', la ceteraj 4 sukcesis 'bone' (pro diversaj kaŭzoj ili mankis en kelkaj instruhoroj).

La infanoj deziris havi ankaŭ lernolibron, tial mi mendis por ili ĉe UEA (Rotterdamo) la lernolibron de P. Korte: *Sub la verda standardo*, kiun la gelernantoj volonte proprakoste aĉetis. Kvankan la lernolibro en nia programo ne estas nepre necesa, tamen stimule influis la lernantojn serĉi kaj legi la instruaĵojn en ĝi.

Kiel ni solvis la provizumandon de la necesaj kontrol-listoj kaj aliaj didaktikaj presaĵoj?

La lernejestro de la lernejo en kiu mi instruas ILon, proponis la multobligadon de

helpmaterialoj tiel, ke ĉiu lernejo aliranta la LOI je siaj kostoj kontribuu al la tuta materialo.

Proponoj por la daŭrigo de LOI en la sekvanta lernejo.

1. La grupo el la 3a lernejo (13 lernantoj) povos regule daŭrigi la lernadon en la lernejo 1979/80. Poste en la 5a lernejo oni povos sekvi kiel la LOI influos oficialan lernadon de fremdlingvo kaj eble ankaŭ la aliajn instruobjektojn, ekzemple: gepatran lingvon, geografion, matematikon.

Mia propono estas, ke tiu ĉi grupo en la 4a lernejo ne lernu (antaŭpreparu) la oficialan fremdlingvon, ĉar tiel oni povus paralele observi la kapablon de gelernantoj, lernintaj Esperanton kaj tiuj antaŭpreparu lernintaj la oficialan fremdlingvon. Tiunmaniere oni povus simple kaj evidente pruvi, ke frua lernado de Esperanto almenaŭ samgrade — tre verŝajne eĉ pli — pozitive influas la fremdlingvo-instruadon (konjekto de la paderborna eksperimento), krom la aparta avantaĝo, ke la lernantoj de Esperanto aldone ekposedas la lingvoscion de Esperanto por praktika uzado, kion cetere atestas la praktiko en la eksperimenta bazlernejo «Oltresavjo» en Ĉezeno (Italujo), kie jam dum pli ol 10 jaroj ekzistas deviga frua ILo-instruado en la 3a-4a lernejo.

2. En la sekvanta lernejo 1979/80 la lerneja instruistaro elektu inter si personon kiu estu kunordiganto de tiu ĉi nia kunlaboro. Plej trafe tiun funkcion transprenu klasestr(in)o de la 3a klaso, kies lernantoj partoprenos la LOI en la lernejo 1979/80.

3. Ĉar montriĝis intereso por Esperanto ĉe lernantoj en superaj klasoj (5a-7a), oni povos formi la grupon de Esperanto-lernantoj en la kadro de liberaj aktivecoj.

4. Ĉar kelkaj aliaj bazaj kaj mez-lernejoj interesiĝas pri enkonduko de Esperanto en siajn progamojn, estus necesaj lernejoj Esperanto-instruistoj. Por tiuj oni povas okazigi intensan kurson (entute 20-30 horoj). La paderborna praktiko pravas, ke eblas dum tiu tempo akiri la necesan gradon pri Esperanto-lingvoscio por poste instrui Esperanton al lernantoj.

5. Aldonaj formoj de nia kunlaboro pere de Esperanto.

— Estas senditaj infandeseĝnaĵoj por la ekspozicio en Finnlando, organizata far de la tiulanda Ministerio por klerigado kaj instruado.

— La membroj de la Esperanto-societo okazigis prelegon pri nazismaj koncentrejoj, kiel nian kontribuon al la soci-politika eduko de gelernantoj. La grupo de junaj ĵurnalistoj en la lernejo intervjuis la membron de la Esperanto-societo, M. Jakupović, esperantisto jam dum 50 jaroj kaj estinta kaptito en la koncentrejo Jasenovac.

— Por la ekspozicio de bazlernejaj diverslandaj lernolibroj, kiun okazigis la urba registaro en Massa (Italujo) sub patroneco de UNICEF, ni partoprenis per lernolibroj (1a-8a klaso) donacitaj tiucele de la lernejo.

Esplereble nia venontjara kunlaboro estos ankoraŭ pli ampleksa kaj sukcesa.

«Ni parolu pri faktoj!»

Yves Guéguénat

Ni publikigas la artikolon de prof. Guéguénat pro ĝia aktualeco. Pluraj personoj nuntempe okupiĝas pri la temo. Bonvolu skribi vian opinion.

La redakcio

En certaj Esperanto-gazetoj aperis kritikaj artikoloj koncerne la diversajn proponojn pri modernigo de ortografio de Esperanto. Por povi pritrakti tiun gravan aferon serioze, estas necese paroli pri faktoj.

1. *Estas fakto ke, el teknologia vidpunkto, la ses specialaj literoj ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ kaj ŭ estas maloportunaj, ĉar ili ofte malhelpis kaj malhelpas ĝustamaniere tajpi Esperanto-tekstojn. Nur la skribmaŝinoj por la lingvoj franca, hispana, itala, nederlanda, portugala, rumana kaj turka ĝenerale posedas la cirkumfleksan supersignon. Male, tri kvaronoj da ĉiuj latin-literaj skribmaŝinoj nuntempe vendataj kaj uzataj (nome tiuj por la lingvoj angla/usona, ĉeĥa, dana, estona, finnlanda, germana, hungara, islanda, latina, norvega, serbo-kroata, slovaka kaj sveda) ne posedas cirkumfleksan kaj ankaŭ ne la supersignon por la litero ŭ.*

Oni do rajtas demandi: Ĉu, en la nuna epoko, artefarita lingvo *ne ĝustamaniere tajpebla per 75% el la milionoj da ekzistantaj latinliteraj skribmaŝinoj* povas ambicii ludi la rolon de 'universala lingvo internacia'? Evidente la respondo ne povas esti jesa.

2. Estas fakto, ke la planoj de la klavaroj de la skribmaŝinoj iĝis starigitaj — konforme al la bezonoj en la diversaj lingvoregionoj — per oficialaj kaj tutmonde validaj normoj teknikaj de I.S.O (International Standardizing Organization, Genève). Pro industriaj kaj komercaj imperativoj, oni ne povas senpere aldoni al la multaj diversaj kategorioj da nunaj skribmaŝinoj kvar pliajn signojn (necesajn por la specialaj literoj minusklaj kaj majuskaj), aŭ substitui tiujn kvar signojn al iuj signoj (aŭ literoj) nun troviĝantaj sur la klavaroj kaj ja nepre bezonataj de la diverslanda uzantaro. Estus do necese, krei seriojn da specialaj novaj maŝinoj por ĉiuj

landoj kaj, tiucele, fari multe kostajn investadojn ne renteblajn, ĉar la kvar pliaj signoj estus bezonataj de relative nur tre malmultaj uzantoj. Kiam oni konas tiujn faktojn, oni komprenas, ke tiu problemo tute ne estas 'facile solvebla', kiel iuj opinias.

3. Estas fakto, ke la situacio estas same malfavora ankaŭ en la industrio de la presado. Oni ne povas facile presigi Esperanto-tekstojn en iuj ajn latinliteraj presejoj kaj, tial, oni ankaŭ ne povas facile aperigi Esperanto-artikolojn en iuj ajn nacia-lingvaj jurnaloj, gazetoj, fakaj revuoj kaj aliaj. Sekve, la publiko ĝenerale scias nion pri Esperanto aŭ supozas ke ĝi malaperis.

4. Estas fakto, ke en la nun rapidege evoluanta informatiko kaj telematiko la supersignoj ne estas tajpeblaj (aŭ nur malĝuste, ekzemple: le[^]go, [^]sipo). Reprezentantoj de la koncerna industrio diras: «Kial vi ne adoptas la sen-supersignan anglan alfabeton? Vi devus reformi la ortografion de via lingvo, anstataŭ postuli ke ni modifu, pro la maloportunaj specialaj Esperanto-literoj, la jam sufiĉe komplikajn kaj multe kostajn komputorojn!»

5. Estas fakto, ke d-ro Zamenhof plurfoje esprimis sian bedaŭron pro la ekzisto de la ses specialaj literoj. Tial, jam en 1887, li proponis la jenan helpan regulon: «Se en presejoj mankas la literoj ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, kaj ŭ, oni povas anstataŭe uzi *ch, gh, jh, sh, kaj u* .» (Vidu ankaŭ en P.I.V. pĝ 189, 370, 913.) Sufiĉas detale elprovadi tiun regulon por konstati, ke ĝi ne estas ĝenerale aplikebla, ĉar multaj rezultantaj vortoj havas misan formon; ekzemploj: anghelo, arhitekto, chemento, dedichi, felicha, hhameleono, hhemio, shohhto, shtrumpo (kaj similaj). Tamen en certaj okazoj, la digramoj *ch* kaj *sh* povas esti tre utilaj; por ekzemploj: ĉevalo/*chevalo* (F: cheval); fiŝo/*fisho* (A: fish) kaj aliaj. — Necesas diri, ke la uzo de tiaj digramoj (*ch, sh*) estas kontraŭa al la principo pri fonetikeco de la lingvo internacia. Sed necesas ankaŭ diri, ke Esperanto ja ne estas plene fonetika: Unue, certaj literoj, nome *c* (prononco: ts!), *ĉ* (pr.: tŝ!), kaj *ĝ* (pr.: dĝ!) *ne* estas fonetikaj; komparu kun *dz* en 'edzo', *ks* en 'ekstra', *kz* en 'ekzakta' kaj *kŝ* en 'kŝatrio'. Due, nombro da Esperanto-vortoj kaj nomoj enhavas duoblajn konsonantojn, por ekzemploj: Anna, Anneta, anno, brutte, Finno, getto, Grakkoj, Isso, Junnan, Krasso, Lasso, Messo, nette, Osso, Pirro, pullo, Rabbi, regatto, robbo, sennora, Sommo, Tasso, tinno, Tullo, vatto, vendetto, villo (vidu en P.I.V.); tio ankaŭ estas kontraŭa al la principo pri plena fonetikeco.

6. Estas fakto, ke nombro da inventemaj Esperantistoj proponis similajn helpajn regulojn, tamen ne pli taŭgajn ol la Zamenhofa, ĉar ili ĉiuj celas konservi la *proncon* de la vortoj, neglektante la *morfologion* (t.e. la *formo* de la vortoj). Por ekzemplo, la diversaj skribformoj proponataj por la vorto 'kondiĉo' (nome: kondiko, kondikko, konditco, konditŝo, kondidzo, kondiqo, kondixo k.a.) estas ĉiuj maltaŭgaj; male, perfekte taŭga estas la vortformo 'kondicio' - laŭ propono de d-ro Zamenhof; vidu en § 7! — simila al 'kondicionalo' kaj al A,F: condition; G: kondition; Hi: condicion; I: condizione; Rum: conditie; same kiel: adicio, ambicio, proporcio, tradicio kaj aliaj.

7. Estas fakto ke, en 1894, d-ro Zamenhof publikigis proponon pri vasta gramatika reformo de la Esperanto-lingvo, kies alfabeto ne plu enhavas supersignojn. En la multaj modifitaj vortoj, ties etimologio (sed, male, *ne* ties *prononco!*) estis laŭeble respektata; jen ekzemploj: anĝelo/*angelo*, arĝento, ĉerizo/*cerizo*, ĉielo/*cielo*, feliĉa/*felica*, forĝi/*forgi*, kondiĉo/*kondicio*, larĝa/*larga*, ŝtono/*stono*, superstiĉo/*supersticio* kaj multaj aliaj. Ĉar la tiama reformopropo — tro radikala pro la multaj gramatikaj ŝanĝoj! — estis malakceptita de 157 personoj kontraŭ 97, la certgrade taŭga reformo de la ortografio ne realiĝis. Tamen, la principo estis ĝusta kaj estas laŭeble aplikinda. (Vidu § 9.)

8. Estas fakto, ke en la Esperanto-alfabeto mankas la literoj *Q, q* (pron.: k), *W, w* (pr.: *u*; en certaj nomoj: *v*), *X, x* (pr.: *ks*; anstataŭ 'ks' kaj 'kz') kaj *Y, y* (pr.: *i*; en certaj nomoj: *j*), kiuj ekzistas pli/malpli en preskaŭ ĉiuj latinliteraj lingvoj. Tiuj literoj estas necesaj:

- a) kiel simboloj kaj por terminoj (pro la etimologio) en la diversaj sciencoj hodiaŭ rapide ampleksiĝantaj, por ekzemploj: acetilo/*acetylo*, aldehido/*aldehydo*, disleksio/*dyslexio*, paroksismo/*paroxysmo*, sinakso/*sinaxo* k.m.a. (komparu ankaŭ kun la afiksoj/afiksoidoj *il, id, dis, ism, sin!*)
- b) por povi ĝuste skribi certajn latinliterajn nomojn ne 'esperantigeblajn', por ekzemploj: Queanbayan, Queaux, Queenstown, Quesnay, Warwick, Yahya, Ysaye (k.m.a.).

9. En 1978 aperis detala leksikologia studo kun serioze ellaboritaj proponoj kiamaniere modernigi 'optimale' (t.e. plejeble taŭge kaj komplete) la Esperanto-ortografion, surbaze de la angla alfabeto, kiu ja ne enhavas supersignojn, kaj kiu ekzistas *sen-escepte* sur la klavaro de ĉiuj latinliteraj skribmaŝinoj, teletajpiloj, maŝinoj por kompostado kaj presado, komputoroj/ordinatoj kaj elektronikaj tradukiloj. Temas pri la 124-paĝa broŝuro "Optimala Ortografio de la internacia lingvo Esperanto" (de A. Lienhardt), certgrade laŭ la indikoj ĉi supraj en § 5, laŭ la Zamenhofa principo menciita en § 7, kaj laŭ la postuloj en § 8. La rezultatoj de tiu studo alportas la eblecon forigi pezan obstaklon sur la vojo de Esperanto al ĝia fina venko.

Ĉar nenio alia estas ŝanĝita en la gramatika strukturo de la lingvo, iuj tekstoj laŭ la nova ortografio estas kompreneblaj same facile kiel tiuj en la laŭ-fundamenta. Sekve, iu risko pri skismo (kiel tiu pro Ido) fakte ne estas timenda.

10. Estas tre probable, ke la plej influaj ŝtatoj en la latinlitera lingvohemisfero rifuzos agnoski la Esperanto-lingvon tiom longe, kiom ties ne-perfekta ortografio ne estos perfektigita. Tial, anticipaj klopodoj ĉe parlamentanoj estas ne nur vanaj sed eĉ danĝeraj, ĉar ili povus grave kompromiti la finan sukceson deziratan de ni ĉiuj.

Al sekciestroj kaj membroj de ILEI

Olle Olsson

De persono, kiu volas esti nekonata, la kasisto de ILEI ricevis monsumon por stipendio(j) al partoprenant(in)o de infankongreso aŭ simila aranĝo, kie infanoj de diversaj landoj renkontiĝas kaj per Esperanto amikiĝas.

La donacinta persono atentigas pri tio, ke la mono estas akirita per diligenta kaj malfacila laboro kaj simpla vivo.

La lernant(in)o devas esti diligenta kaj en aĝo de lernantoj en la deviga lernejo. La kasisto de ILEI atendas esperantlingvan raporton de la stipendiul(in)o post la partopreno de la infanrenkontiĝo kun respondo je ekzemple jenaj demandoj: Kio okazis dum la kongreseto? Ĉu vi trovis amik(in)on? El kiu lando li (ŝi) estis? Kio plaĉis al vi plej multe? k.t.p.

La membro-instruist(in)o, kiu deziras peti stipendion por infano en sia kurso devas respondi jenajn demandojn:

1. En kiu infanrenkontiĝo vi intencas partopreni? (kiam? kie? aranĝanto? adreso?)
2. Kio estas la nomo kaj adreso de la infano (li aŭ ŝi)?
3. Kiom da jaroj havas la infano?
4. Ĉu la infano bone povas konversacii en Esperanto kun samaĝuloj pri temoj rilatantaj al la infana aĝo?
5. Ĉu la infano estas diligenta kaj ne-riĉa?
6. Kiom kostas la restado de la renkontiĝo?
7. Kiom hostas la vojaĝo (tien kaj reen) al la renkontiĝo? (Prefere en svedaj kronoj aŭ germanaj markoj.)
8. Ĉu vi promesas sendi esperantlingvan raporton pri la renkontiĝo al la kasisto de ILEI en unu monato post la fino?

La peton pri stipendio bonvolu sendi minimume tri monatojn antaŭ la komenciĝo de la renkontiĝo al la kasisto de ILEI, s-ro Olle Olsson, Bantorget 3, S-222 29 Lund, Svedujo.

Espereble simila stipendio estos disdonita venontjare.

Malagasio aŭ Madagaskaro

Eugène Raveloson

Multaj el ni eble demandas: kial Malagasio kaj ne Madagaskaro aŭ Malgaŝujo por nomi la izolitan insulegon banita de la Hinda Oceano, oriente de Afriko de kiu ĝi estas apartigita de la Mozambika kanalo?

La ekuzo de la vorto ne estas nova, ĉar la 28an de januaro 1965 — antaŭ 12 jaroj — s-ro Eugène Raveloson proponis al la komisiono pri geografiaj nomoj de la Akademio de Esperanto sian pristudon rilate al tiu nomo. Jen kiel li tiam prezentis ĝin:

Madagaskaro

Madagaskaro

angla vorto esperantigita. La plej ĝusta estas (devas esti) “Madagasikaro”, ĉar en la nacia lingvo oni diras “Madagasi-kara” (la nomo de la insulo).

Madagaskar-ano

estas ĉiuj, kiuj loĝadas la insulon, ĉu ili estas francoj, aŭ angloj aŭ italoj, germanoj ktp.

Do mi proponas al vi laŭ la difino uzi: Malagaso / Malagasa / Malagasio anstataŭ aliaj vortoj (kp. PIVn.).

Malagasio

Malagas-io/-ujo

vera signifo de la nomo de la insulo. La enloĝanto naskiĝinta estas “Malagaso”, ĉar en la nacia lingvo oni diras “Malagasi” (la akcento estas sur la antaŭlasta silabo, t.e. “ga”).

Malagas-o/-a/-io

Malagaŝo estas nur franca vorto esperantigia, do ĝi *ne estas konsilenda*.

Noto: en Malagas-o/-a/-io, la litero “s” ne portas supersignon.

Alvoko

Zsuzsa Barcsaj

Reprezentanto de Hungara Esperanto-Asocio estis invitita al landa konferenco de Unesko-asociiĝintaj lernejoj, tiel la estro de la lerneja sekcio de Instrua Komisiono de HEA partoprenis ĝin la 27-29an de septembro 1979. (Detalan raporton vd. en la n-ro 10/79 de Budapeŝta Informilo.)

Rezulte de nia propono pri kunlaboro en la konferenco estis protokolita jena interkonsento:

HEA helpas peri eksterlandajn adresojn al hungaraj Unesko-lernejoj por kontaktigi ilin kun celo de korespondado kaj precipe de reciproka aranĝo de lingvoekzercaj tendaroj.

La korespondado kaj la lingvotendaroj koncernas provizore *ne la ILO-n*, sed iun el la kutime lernataj naciaj lingvoj (angla, franca, germana, rusa ktp.). Tio *devas esti* la unua paŝo.

Kaj se en la kontaktigo nia helpo pruvigas utila, ne-mankavebla, ni havos pli da bazo enpenetri la ILO-n en la Unesko-lernejojn.

Nia alvoko al vi havas duoblan celon:

- A) almenaŭ en kelkaj landoj samtempe proponi kunlaboron kun la nacia Unesko-komitato sur lerneja tereno, resp. revigligi tion,
- B) kun via helpo efektiviĝi la servon por liveri adresojn.

Do:

- A) 1. Bv. informiĝi pri la celo, laboro, regularo de vialandaj Unesko-lernejoj (ni faris tion ĉe la Mezlerneja Sekcio de Ministerio pri Instruado).
- 2. Bv. kontakti kun via nacia Unesko-komitato kaj informi ĝin, ke niaj kaj iliaj edukceloj estas la samaj, do proponu kunlaboron, ofertu helpon al ili; petu, ke reprezentanto de via Esperanto-Asocio partoprenu iliajn kunsidojn kaj inverse.
- 3. Bv. informi nin pri la rilato de via Esperanto-Asocio kun via nacia Unesko-komitato.
- B) 1. Bv. sendi al ni la adresaron de vialandaj Unesko-lernejoj; se en iu el ili okazas Esperanto-instruado, bv. tion aparte noti.

2. Bv. sendi al ni la adresojn de tiuj lernejoj (kun 14-18-jaraj gelernantoj), kie Esperanto estas instruata.

Kaj fine, bv. kiel eble plej baldaŭ reagi al niaj petoj, eĉ se vi momente nur 1-2 lernejojn povas mencii.

La Unesko-lernejoj ĉe ni tucerte baldaŭ postulos de ni plenumi la promesitam helpon, sed momente ni havas entute unu adreson (kolegino el Pollando iniciatis similan kontakton).

Komprenoble ankaŭ ni volonte estas je via dispono kun similaj indikoj.

Ni esperas kaj kalkulas je via kunlaboro, kaj atendas vian konkretan kontribuon.

Unua Tut-Amerika Esperanto-kongreso

Enrique Kohei

Al la esperantistaro de la tuta mondo, ni informas ke de la 12a ĝis la 15a de Julio, 1980a, okazos en la urbo San Luis, Argentino, la Unua Tut-Amerika Esperanto-Kongreso.

Amerikanoj kaj neamerikanoj estas kore invitataj por partopreni en ĉi tiu festo, kiu okazos en urbo San Luis malavare dotita de la Naturo kaj kie ĝiaj loĝantoj kaj konstruaĵoj estas esprimoj de enlandaj argentinaj karakterizoj.

La organizantoj entreprenis la starigon de aktuala impona ekspozicio por elmontri la eĥon de ĉi tiu evento en la tuta mondo, kaj konsekvence la ampleksan disvastigadon de Esperanto.

Tial oni petas al la geesperantistoj de la tuta mondo, ke ili *de nun* sendu salutojn por la kongreso, preferinde per poŝtkartoj. Libro, revuoj, bultenoj, en Esperanto, estos bonvenaj, precipe se ĉi-lastaj enhavas anoncojn pri ĉi tiu kongreso.

Bonvolu adresi vian korespondadon al: 1-a Tut-Amerika Esperanto-Kongreso — Casilla Correo Central 289 — 2000 Rosario — Argentino.

Aŭstralujo	Jean Lehane, 2A Harms st., Toowoomba, Queensland 4350
Aŭstrujo	Ernst Rixner, Kleingasse 6, 18/8/13, A-1030 Vieno
Belgujo	E. Van Damme, Albert-I-straat 44, B-1750 Schepdaal
Brazilo	Elvira Fontes, C. P. 5888 São Paulo
Britujo	Hilary Chapman, 7 Fairacre road, Barwell, Leicester LE9 8HH
Bulgarujo	Vasil Bozarov, ul. Ljubotran 98, blok 4, Vhod A, Sofia
Danujo	Lis Thune, Bremsbävänget 15, DK-2650 Hvidovre
Finnujo	Pentti Jarvinen, Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82
Francujo	Frédéric Le Magadure, 23 rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont
F R Germanujo	Hermann Behrmann, Grunigerstr. 5, D-4790 Paderborn
Grekujo	K. Koliopoulos, Plateia Pagratiou 5, strato Pyrou 28, Ateno (506)
Hispanujo	Francisko Zaragoza Ruiz, Coll. Nacional, Callosa de Segura, Alicante
Hungarujo	Zsuzsa Barcsay, Bem Kp. 25/b, H-1011 Budapest
Islando	Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, Reykjavík
Israelo	Reuven Alberg, str. Kraus 12, Tel-Aviv, Ramat Aviv
Italujo	Catina Dazzini, C. P. 22, I-54100 Massa, pĉk. 22-2883
Japanujo	Fusakugu Kido, Gamon Higashi 6-51, Kosigaja Saitama 343
Jugoslavujo	Miodgrad Stojanović, Duruntorska ul. 2:IV-32, YU-11000 Beograd
Luksemburgo	Robert Hoenerger, 4 rue des Charbons, Esch sur Alzette
Kolombujo	Manuel Angel M., Apartado Aéreo 50179, Medellin
Koreujo	----
Malagasujo	Eugene Raveloson, B P 127, Antananarivo
Nederlando	Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl
Nordameriko	John L. Lewine, West Stockbridge, MA 01266
Norvegujo	M. Landmark, Univ. i Oslo, Psykologisk Inst., PB 1094, Blindern, Oslo 3
Nov-Zelando	Gvenda Sutton, 1 Wood street, Upper Hutt
Polujo	Stefania Pakalska, Marszalkowska 53, m. 50, PL-00-676 Warszawa
Rumanujo	----
Sanmarino	Marina Michelotti, via 25 marzo 73, I-43031 Repubblica di San Marino
Sovetujo	Johannes Palu, Sõlme 21, SU-200016 Tallinn, Eesti NSV
	Nikolaj Starodubčev, Poŝtrestante, SU-340047 Doneck
Sud-Afriko	Adèle Fouché, 6 Astoria Court, Summerstrand, Port Elisabeth 6001
Svedujo	Olle Olsson, Bantorget 3, S-22229 Lund
Svisujo	Jean Jacques Lavanchy, Traménaz 21, CH-1814 La Tour de Peilz
Venezuelo	Esteban E. Mosonyi, Apartado 61500, Chacao, Caracas.

IZOLITAJ MEMBROJ

Ĉeĥoslovakujo	Karel Kraft, Zupanovice 49, CS-26214 Hřimezdice Okr. Píbram
Ĉinujo	Lu Chien-bo, Szechuan Universitato, Chengdu, Szechuan
Germana D R	Till Dahlenburg, str. d. DSF 13, DDR-2722 Brühl
Irano	M. Saghafian, Siras ave., Emdadi st. 22, Vanak, Teheran 19
Jemena PDR	Jozefo Megyeri, Al-Gomhouriyeh Hospital, Khormaksar, Aden
Kubo	Pedro Pablo Lamas Díaz, Apartado 223, Ciego de Avila
Singapuro	Hongi Liao, apt. blk. 14, 2809 H, Eunos Crescent, Singapuro 14
Zairujo	Antoine-Samuel Ngangu, B P 13, Lukala, Nkandu

ESTRARO DE ILEI

prezidanto	rektoro Helmut Sonnabend, In den Horstwiesen 42, D-3150 Peine, F. R. Germanujo
vicprezidanto	direktoro Johano Ingusz, Liget út. 40, H-1102 Budapest X, Hungarujo
sekretario	d-ro prof. Mario Dazzini, C. P. 22, I-54100 Massa, Italujo
vicsekretario	prof. Francisko Zaragoza Ruíz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante, Hispanujo
kasisto	Olle Olsson, Bantorget 3, S-22229 Lund, Svedujo

KUNLABORANTAJ ORGANIZOJ

FIMEM	Fédération Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne
SAT	Sennacieca Asocio Tutmonda
UEA	Universala Esperanto-Asocio
Unesko	Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO – IPR

organo de

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj – ILEI

en rilatoj de reciproka informado kun Unesko, kategorio C

aperas trifoje jare

redaktas – Helmut Sonnabend, In den Horstwiesen 42, D-3150 Peine, FRG

poŝtĝirkonto – Stockholm 682-117-7 ILEI, Bantorget 3, S-22229 Lund, Svedujo

jarabono – 20 svedaj kronoj

la abonprezon oni pagu al la landaj sekcioj de ILEI

nemembroj de ILEI pagu al la supre indikita poŝtĝirkonto